

Primo dierum omnium

Brevier-Himno

Ordinara tempo > 1-a kaj 3-a semajno > dimanĉo > horo de la legajoj > nokte

*Primo dierum omnium,
quo mundus exstat conditus
vel quo resurgens Conditor.
nos, morte victa, liberat,*

El ĉiuj tagoj tiu ĉi
l' unua estas, tag' de l' glor'.
En ĝi sin levis kun jubil'
la nov-kreita univers'.

En tiu ĉi solena tag'
leviĝis Kristo el la mort',
venkinte Li kondukis nin
el mort' kaj peko al liber'.

*Pulsis procul torporibus,
surgamus omnes ocuis,
et nocte quæramus pium,
sicut Prophetam novimus.*

Rapide ni leviĝu do,
en tiu nokt', sen iu lac',
kaj, laŭ la diro de l' profet',
Lin, la Piulon, serĉu ni.

*Nostras preces ut audiat
suamque dextram porrigat,
et hic piatos sordibus.
reddat polorum sedibus,*

Nin Dio aŭdu, helpu nin,
konduku nin per forta man'
el nia feblo al la glor'
en Sia regno de l' ĉiel'.

*Ut, quique sacratissimo
huius diei tempore
horis quietis psallimus.
donis beatissimum muneret.*

Per tiu nokta solenad'
kun psalmoj ni komencas nun
la sanktan tagon de l' Sinjor'.
Li estu nia rekompenc'.

*Deo Patri sit gloria
eiusque soli Filio
cum Spiritu Paraclito,
in sempiterna sæcula.*

Al Di', la Patro, estu glor',
al Kristo, Lia sola Fil',
al Di', la sankta Paraklet',
tra ĉiuj tempoj, en etern'.

Amen.

Amen.

latina T: 7-a/8-a jarcento

E: Albrecht Kronenberger 2004